

Gvidilo kaj taskaro por la Kasisto de ILEI

El ĉi tiu baza jarplano de konstantaj devoj, necesas krei specifan taskaron por ĉiu jaro.

Jan:

- Konsultu kun sekretario pri la laŭlanda statistiko por la antaŭa jaro.
- Pretigu kun sekretario kaj estrarano pri landa agado proponliston por Koleghelpa Kaso (KhK).
- Anoncu al FEL ĉiujn novajn paperajn membrojn por la nova jaro antaŭ IPR1.

Feb:

- Decidigu KhK estrare, registru subtenotojn, kaj anoncu adresojn al FEL antaŭ apero de IPR1
- Lasta klopodo fermi la kontojn de la antaŭjara konferenco.

Mar:

- Ricevu ĉiujn membriĝojn de la sekcioj, kaj de individuoj.
- Alvoku por novaj membroj, rektaj aŭ sekciaj; laŭeble revarbu eksmembrojn
- Kunlaboru kun la sekretario vekti neaktivajn sekciojn, proponu financajn solvojn se necese.

Apr:

- Preparu membraron por IPR2 - afiŝigu kun sekretario la membrolistojn (sen adresoj) kaj statistikon, tiel ke sekciestroj povos kontroli, ke ĉio sendita estas registrita.
- Kontrolu la membronombrojn deklaritaj en la LS-raporto kontraŭ la pagoj.
- Finpretigu kontojn el la antaŭa jaro kaj aranĝu revizoradon.

Majo:

- Kontrolu, ke ĉio financa pri la konferenco progresas laŭplane.
- Prizorgu montransigojn al la konferenco.

Junio:

- Liveru revizoritajn kontojn el la antaŭ la jaro por la estrara jarraporto.

Julio:

- Donu al la estraro superrigardon de la realaj spezoj de la kuranta jaro - ĉu okazis signifaj surprizoj?

Aŭg:

- Ricevu spezojn el la konferenco kaj UK: el libroservo, membriĝoj ks, tuje konataj kostoj ks.

Sept:

- Pretigu kun la prezidanto kaj aliaj buĝetproponon por la sekva jaro.

Okt:

- Donu al la estraro ĝisdatigitan superrigardon de la realaj spezoj de la kuranta jaro antaŭ la aŭtuna kunsido. Surprizoj? Uzeblaj rimedoj? Ne devas esti cifera, sed impresa raporto.

Nov:

- Provu havi la konferencajn rezultojn, por povi fermi la kontojn de la kuranta jaro.

Dec:

- Liveri jarfinan superrigardon pri la spezoj kaj fondaĵoj.

- Konigu kiom eble la rezultojn por la finiĝanta jaro, kaj modifu la novan buĝeton laŭ tio, antaŭ ol la estraro proponu ĝin al la komitato.

Ĝenerale:

La estraro kaj komitato kutime bone scias pri la financaj rezultoj de la antaŭa jaro, ĉar ili estas aperigitaj, revizoritaj kaj supozeble akceptitaj de la Komitato. Ĝi scias la intencojn por la sekva jaro, ĉar ĝi ellaboris buĝeton. Sed mankas informoj pri la financa misfarto aŭ bonfarto de la Ligo en la kuranta jaro, tiel ke tre malfacilas fari bonajn decidojn, ĉu ekspansii aŭ limigi la agadon (aŭ almenaŭ la elspezojn). Dezirinde estus, se la kasisto povus ĉiun trian monaton doni indikon pri neatenditaj evoluoj. Por ebligi tion, estraranoj kaj agantoj devas liveri al kasisto siajn kostojn aŭ enspezojn multe pli regule kaj frue. Havi superrigardon pleje gravas tuj antaŭ la konferenco kaj jarfine, antaŭ ol finbeni la buĝeton por la sekva jaro. Havi impreson pri nia farto en la finiĝanta jaro ege pli utilas ol analizi historiajn tendencojn.

Pretigis: Stefan MacGill, aug 2010 ĝisdatigo 1 Feb, 2011